

Espero Katolika



Se ni deziras konkeri
la mondon,
ni ne povas tion fari
per bomboj.
Ni konkeru la mondon
per nia amo.
Ni interplektu nian
vivon per ŝenoj
de ofero kaj amo.

Beata Tereza

Numero 1-3/2010

Januaro-Marto 2010



Sur la kovrilo: *Fotoj kaj frazo de Beata Patrino Tereza de Kalkuto: la nuna jaro 2010 estos markita de la 100a datreveno de ŝia naskiĝo (v. p. 14-16).*

ENHAVO

KRISTNASKON 2009

Mesaĝo de Papo Benedikto la 16-a “Urbi et Orbi”	3
Esperantistoj en placo sankta Petro	5
KANTO: Kion signifas bril’ sur la ĉiel’	5
Sankta Klaus: variacio je Kredsimbolo	6

SANKTA PAROĤESTRO JOHANO MARIA VIANNEY EL ARS

Sankta donaco de la sacerdoteca sakramento	7
--------------------------------------------	---

OCEANO DA VERO	8
----------------	---

CENT JAROJ DE IKUE: Doktoro Pierre Corret (1881-1936)	9
--------------------------------------------------------------	---

PREĜO AL JESU-INFANO DE PRAGO	12
-------------------------------	----

MEMORŜTONO VATIKANO 2	13
-----------------------	----

1910-2010: PATRINO TEREZA “LA SIMPLA VOJO”

Ami kaj agi fidante (prelego pri ŝia biografio)	14
-------------------------------------------------	----

Himno de la vivo	16
------------------	----

LAŬDKANTO DE MARIA	16
--------------------	----

KATOLIKA ESPERANTO-MOVADO EN LITOVIO	17
--------------------------------------	----

SALUTON, MARIA!	19
-----------------	----

MOVADAJ INFORMOJ	20
------------------	----

Centra Oficejo de IKUE: Via di Porta Fabbrica 15, I-00165 ROMA RM, Italio

Telefono kaj fakso: +39-06.39.63.81.29 - Elektronika poŝto: <ikue@ikue.org>

TTT-paĝoj: <http://www.ikue.org> - <http://www.esperokatolika.org> * Dissendolisto: <ikue@yahoo.com>

UEA-konto “ikue-v” * Banko: “Unione internazionale cattolica esperantista” Roma, Italio

IBAN IT34H0760103200000023290000 - BIC/SWIFT: BPPHITRRXXX

Registriĝo ĉe la tribunalo de Romo - Registrazione presso il Tribunale di Roma

n. 17138, 11-2-1978

Gratis agli Associati

Presejo - Tipografia

ROTASTAMPA s.a.s. - Via G. Mirri 21, 00159 ROMA RM, tel. +39-06.43.80.051

Respondeca Direktoro - Direttore responsabile

Antonio DE SALVO, Via Aldebaran 13, Parco Azzurro, I-00010 GUIDONIA RM, Italio
tel. (vespere) +39-07.74.36.36.03 E-poŝto: <antoniodesalvo@tiscali.it>

Espero Katolika, revuo fondita en 1903, estas oficiala organo de I.K.U.E.

INTERNACIA KATOLIKA UNUIĜO ESPERANTISTA internacia asocio de fideluloj fondita en 1910, agnoskita laŭ pontifika juro per Dekreto n. 196/92/S-61/B-25 de 11.2.1992 de la PAPA KONSILIO POR LAIKOJ. **Honora Prezidanto:** Sac. Duilio Magnani - **Prezidanto:** Miloslav Šváček - **Vic-Prezidanto:** Sac. Attila Szép - **Vic-Prezidantino:** Marija Belošević - **Ĝenerala Sekretario:** Carlo Sarandrea - **Kasisto, direktoro de la C.O.:** Antonio De Salvo - **Estraranoj:** Sac. Gabriel Anda, Sac. Lajos Kóbor, Bruno Masala, Stanisław Śmigielski - **Kontorevizoroj:** Giovanni Daminelli, Pavol Petrik.

Mesaĝo de Papo Benedikto la 16-a “*Urbi et Orbi*”

Karaj fratoj kaj fratinoj de Romo kaj de la tuta mondo, kaj vi ĉiuj, viroj kaj virinoj amataj de la Sinjoro! “*Lux fulgebit hodie super nos, quia natus est nobis Dominus.*” “Granda lumo hodiaŭ brilas super ni, ĉar hodiaŭ naskiĝis al ni la Sinjoro”.



La liturgio de la Meso de la Aŭroro memorigis al ni ke jam la nokto forpasis, la tago antaŭeniĝis; la lumo kiu elradias el la groto de Bet-Leĥem brilegas super ni.

Tamen, la Biblio kaj la Liturgio ne parolas al ni pri la natura lumo, sed pri lumo alia, speciala, en kelka maniero alcelita kaj orientita al iu “ni”, tiu sama “ni”, por kiu la Infano de Bet-Leĥem “naskiĝis”. Ĉi tiu “ni” estas la Eklezio, la granda universala familio de la kredantoj en Kristo, kiuj atendis kun espero la novan naskiĝon de la Savanto kaj hodiaŭ celebras en la mistero la ĉiaman aktualecon de ĉi tiu evento.

Komence, ĉirkaŭ la kripo de Bet-Leĥem, tiu “ni” estis preskaŭ nevidebla je la okuloj de la homoj. Kiel raportas al ni la Evangelio laŭ sankta Luko, ĝi ampleksis,

krom Maria kaj Jozefo, malmultajn humilajn paŝtistojn, kiuj alvenis al la groto sciigite de la Anĝeloj. La lumo de la unua Kristnasko estis kvazaŭ fajro ekbruligita en la nokto. Tute ĉirkaŭe estis mallumo, dum en la groto brilegis la vera lumo “kiu lumas al ĉiu homo” (Joh 1,9).

Kaj tamen ĉio okazas en la simpleco kaj en la kaŝiteco, laŭ la stilo, kun kiu Dio agadas en la tuta historio de la savo. Dio amas ekbriligi malvastajn lumojn, por poste lumigi larĝamplekse. La Vero, samkiel la Amo, kiuj konsistigas ĝianenhavon, ekbrilas tie kie la lumo estas akceptata, kaj poste ĝi disvastiĝas laŭ samcentraj radioj, kvazaŭ pro kontakto,

en la korojn kaj en la mensojn de tiuj, kiuj libere sin malfermante al ĝia brilego fariĝas siavice fontoj de lumo. Estas la historio de la Eklezio, kiu komencas sian iradon en la malriĉa groto de Bet-Leĥem, kaj tra la jarcentoj fariĝas Popolo kaj fonto de lumo por la homaro. Ankaŭ hodiaŭ, pere de ĉiuj, kiuj iras renkonte al la Infano, Dio ankoraŭ ekbruligas fajrojn en la nokto de la mondo, por voki la homojn rekoni en Jesuo la “signon” de lia sava kaj liberiga ĉeesto kaj plivastigi la “ni” de la kredantoj en Kristo al la tuta homaro.

Kie ajn estas iu “ni”, kiu akceptas la amon de Dio, tie brilegas la lumo de Kristo, ankaŭ en la plej malfacilaj situacioj. La Eklezio, samkiel la Virgulino Maria, oferdonas al la mondo Jesuon, la Filon, kiun Ŝi mem ricevis donace, kaj

kiu venis liberigi la homon el la sklaveco de la peko. Samkiel Maria, la Eklezio ne timas, ĉar tiu Infano estas ĝia forto. Sed ĝi ne tenas Lin por si: ĝi Lin oferdonas al ĉiuj, kiuj Lin serĉas kun koro sincera, al la surteraj humiluloj kaj al la afliktitoj, al la viktimoj de perforto, al ĉiuj kiuj sopiregas la bonon de la paco. Ankaŭ hodiaŭ, por la homa familio profunde markita de serioza krizo ekonomia, sed pli frue morala, kaj de la suferigaj vundoj de militoj kaj malpacoj, laŭ la stilo de la kundivido kaj de la fideleco al la homo, la Eklezio ripetis kun la paŝtistoj: “Ni iru ĝis Bet-Leĥem” (Luk 2,15), tie ni trovos nian esperon.

La “ni” de la Eklezio vivas tie, kie Jesuo naskiĝis, en la Sankta Lando, por inviti ĝiajn loĝantojn forlasi ĉian logikon de perforto kaj venĝo, kaj sindevigi kun denova vigleco kaj sindonemo survoje al paca kunekzistado. La “ni” de la Eklezio ĉeestas en la ceteraj Landoj de Meza Oriento. Kiel ne pensi je la turmentata situacio en Irako kaj je tiu malgranda ŝafaro da kristanoj, kiu vivas en tiu Regiono? Ĝi kelkfoje trasuferas perfortaĵojn kaj maljustaĵojn, sed ĝi ĉiam strebas doni sian kontribuon al la konstruo de la civila kunvivado kontraŭa al la logiko de la kunpuŝiĝo kaj al la malakcepto de la najbaro. La “ni” de la Eklezio agadas en Srilanko, en la korea Duoninsulo kaj en Filipinoj, samkiel en aliaj aziaj landoj, kiel fermento de repaciĝo kaj paco. En la afrika Kontinento ĝi senĉese levas sian voĉon al Dio per preĝpeti la finon de ĉia trudaĵo en Kongolanda Demokrata Respubliko; ĝi invitas la civitanojn de Gvineo kaj de Niĝerlando al la respekto de la rajtoj de ĉiu persono kaj al la dialogo; al tiuj de Madagaskaro ĝi petas, ke ili superu la internajn dividojn kaj sin akceptu reciproke; al ĉiuj ĝi memorigas, ke ili estas vokataj al la espero, malgraŭ

la dramoj, la provoj kaj la malfacilaĵoj, kiuj daŭre ilin afliktas. En Eŭropo kaj en norda Ameriko, la “ni” de la Eklezio stimulas al superado de la egoisma kaj teknikema pensmaniero, al akcelado de la komuna bono kaj al la respekto je la pli malfortaj personoj, ekde tiuj ankoraŭ ne naskiĝintaj. En Honduro ĝi helpas rekomenci la institucian vojon; en la tuta Latinameriko la “ni” de la Eklezio estas identiga faktoro, pleneco de vero kaj karitato, kiun neniu ideologio povas anstataŭi, alvoko al la respekto je la nefordoneblaj rajtoj de ĉiu persono kaj al ĝia tuteca evoluo, anonco pri justeco kaj frateco, fonto de unueco.

Fidela al la ordono de sia Fondinto, la Eklezio estas solidara kun tiuj, kiuj estas trafitaj de naturaj katastrofoj kaj de malriĉeco, ankaŭ en la riĉegaj socioj. Antaŭ la elfuĝo de tiuj, kiuj migras el sia lando kaj estas puŝataj malproksimen de la malsato, de la netoleremo aŭ de la media malboniĝo, la Eklezio estas ĉeesto, kiu vokas al akceptado. Unuvorte, la Eklezio anoncas ĉie la Evangelion de Kristo malgraŭ la persekutoj, la diskriminacioj, la atakoj kaj la indiferenteco, kelkfoje malamika, kiuj – eĉ – ebligas al ĝi kundividi la sorton de sia Majstro kaj Sinjoro.

Karaj fratoj kaj fratinoj, kia granda donaco partopreni en kunuleco kiu estas por ĉiuj! Ĝi estas la kunuleco de la Plejsankta Triunuo, el kies koro malsupreniris en la mondon la Emanuelo, Jesuo, Dio-kun-ni. Samkiel la paŝtistoj de Bet-Leĥem, ni kontemplu plenaj je miro kaj je dankemo ĉi tiun misteron de amo kaj de lumo! Bonan Kristnaskon al ĉiuj!

Tradukis D-ro Antonio De Salvo

Post la kristnaska mesaĝo la Papo eldiris siajn bondezirojn en 65 lingvoj (ĉi-jare aldoniĝis la kazahia). Post la gvarania sekvis tiu en Esperanto:

“Dibenitan Kristnaskon kaj prosperan novjaron!”



Samkiel dum la antaŭaj mesaĝoj kaj benoj de la Papo “Urbi et Orbi”, ankaŭ ĉi-foje grupo da esperantistoj ĉeestis en Placo de Sankta Petro, por levi alten la panelojn, kiuj konsistigis la vorton “Esperanto”.

De maldekstre: Patrizio Cilli, Jitka Skalická, Giovanni Conti, Enrico Cecchetto, Isabella Fonseca Clerici, nekonata pilgrimulo, Felice Sorosina, Daniela Quartieron, Giovanni Daminelli. Ekster la foto, sed panelportintoj: Filomena Canzano, Elio Bonomolo. La foto transprenita el <http://www.ikue.org/kristnasko2009/kristnasko2009.htm>

KION SIGNIFAS BRIL' SUR ĈIELO

Teksto: J. V. Kamarýt Melodio: P. J. Mathon

Traduko: Josef Cink

1. Ki - on sig - ni - fas bril' sur ĉi - e - lo, e - stis ne -
 ni - am nokt' kun ĉi he - lo. Ste - loj be - le - ge bri - las,
 pri la no - vaĵ' ju - bi - las, pri la no - vaĵ' ju - bi - las.

2. Bela anĝelo venas al tero, / portas la ĝojon kun la espero: / “Gloro al Di' ĉiela, /
 [: pac' al popol' fidela”. :]

SANKTA KLAUS: VARIACIO JE KREDSIMBOLO

Sur nia planedo formortas animalaj specioj kaj tradicioj. En la unua kazo formortadon kaŭzas flanka produkto de civilizacio kaj la homaro ion neanstataŭigeble perdas.

Se formortas tradicio, do el du kazoj. Aŭ ĝi dumtempe laciĝis, ĉesis esti alloga, ne estis revivigita, aŭ ĝi estis laŭplane likvidita, kiel pri tio atestas neforgesebla esprimo de iama ĉeĥoslovaka komunisto prezidento Zápotocký, kiu anoncis al la nacio, ke Jesueto maljuniĝis, alkreskis al li barbo kaj li iĝis Avo Frosto. Nia kamaradino instruistino ofte eraris kaj nomis lin kamarado Frosto. Jen la nevola pruvo, ke la tradicio – diference de la animalaj specioj – anstataŭigebla estas.

La supre menciita fenomeno de perdo de la tradicioj rilatas ne nur la festotagon de sankta Nikolao, sed ankaŭ de kristnaskaj festotagoj, kiuj ne malrapide, sed relative rapide, perdis el la popolo ĝenerala sian originan signifon. La perdo de la signifo je unu flanko estas akompanata per ekesto de ridigaj situacioj; de la dua flanko, kiam ekzemple al mi, al kristano, deziras obstinaj negantoj de Dio “feliĉajn kaj gajajn kristnaskajn festojn”. Feliĉe mian rideton ili ĉiam komprenas kiel esprimon de dankoj.

Moderna imitaĵo de malnova Nikolao estas juna Sankta Klaus. Mi ne scias, kial ĝuste Sankta. Eble pro tio, ke neniu lin intermiksi kun lia samnomo, kiu verŝajne ne ĝisatendos tiun atributon. Sed estas ĉi tie. Li rikanas al ni el ĉiuj flankoj vestita en ruĝa vestaĉo kaj li kondukas kiel simbolo de nova kulturo, jes rekte de nova kredo. La kredo je moderna “sankta triunuo”: liberalismo-relativismo-konsumismo.

Sed kion fari? La ŝanĝo estas la vivo. Ŝanĝiĝas jarkalkuloj, vetero kaj politikistoj, do kial devus enmonde iradi nur

konstante Nikolao, kiel reprezentanto de venkitaj vivnormoj? Oni povas lin eĉ kulpigi pro provokacio, ĉar per rigardo al kruco sur lia ornato povus iu ekhavi ideon, ke ne nur per la pano vivas la homo.

Kaj tiukaze do devas estis ŝanĝita ankaŭ esprimmaniero de dogmatiko. En parafrazo al Kredo oni do povas diri: Ni kredas ankaŭ je Sankta Klaus, ne naskita, sed kreita, samsubstanca kun komercado. El konsumismo kaj liberalismo li devenas, kun konsumismo kaj relativismo li estas same adorata kaj glorata kaj parolas per buŝo de reklamo. Mi kredas, ke li venos kun gloro pridonaci per rideto riĉulojn kaj eĉ la malriĉulojn, ke li venos el ĉiuj reklamtabuloj kaj ankaŭ el mediat-reklamoj, kaj ŝajnas, ke lia regno estos senfina.

Mi persone opinias, ke ĉi-foje eble nur ĝis Epifanio.

D-ro Max Kašparů



SANKTA DONACO DE LA SACERDOTECA SAKRAMENTO


Sankta paroĥestro Johano Maria Vianney el Ars konsciiĝis pri la respondeco por la savo de siaj paroĥanoj kaj de ĉiuj, kiuj utiligis lian pastran servon. Li konsciiĝis, kiel granda donaco por la homaro estas sakramento de la sacerdoteco, per kiu Jesuo senĉese reĉeestigas sian savofaron. Tial li emfazadis al la kredantoj, ke la sacerdoteco estas la sakramento, kiu rilatas ĉiujn homojn. “La sacerdoto estas la homo, kiu de Dio ricevis ĉiun lian povon. Kiel la Patro sendis min, tiel ankaŭ mi vin sendas, diris la Sinjoro al la unuaj sacerdotoj. Iru en la tutan mondon kaj prediku la evangelion al ĉiu kreitaĵo. Kiu vin aŭskultas, tiu min aŭskultas; kiu vin malŝatas, tiu min malŝatas,” li predikadis.

“Kiam la sacerdoto donas pekabsolvon, li ne diras: «Dio al vi pardonas», sed «Mi pardonas al vi». Ĉe transsubstancigo li ne diras: «Tio estas Korpo de la Sinjoro», sed «Tio estas mia Korpo». Se ni ne havus sakramenton de la sacerdoteco, ni ne havus inter ni la Sinjoron. Kiu Lin metis en la tabernaklon? La sacerdoto. Kiu akceptis viajn animojn en la komunumon de la Eklezio, kiam vi naskiĝis? La sacerdoto. Kiu ilin satigas, ke ili havu forton por la surtera pilgrimado? La sacerdoto. Kiu ilin preparas, por ke ili povu ekstari antaŭ Dio banitaj en la Sango de Kristo? La sacerdoto, ĉiam la sacerdoto. Kaj se via animo falos en la mortigan pekon, kiu vin vivigos por la vivo? Nur la sacerdoto. Vi trovos neniun bonon, kiu devenas de Dio, por ke malantaŭ ĝi ne staru la sacerdoto.

Provu pekkonfesi antaŭ Dipatrino aŭ antaŭ anĝelo. Ĉu ili pekabsolvos vin? Ne. Ĉu ili povas al vi doni Korpon kaj Sangon de la Sinjoro? Ne. La Plejsankta Virgulino Maria ne havas povon fari el hostio la Korpon de sia Filo. Eĉ se antaŭ vi

starus aro de ducent anĝeloj, ili ne havas la povon pardoni al vi la pekojn. Nur la sacerdoto povas diri: «Mi pardonas viajn pekojn, iru en paco».

La sacerdoteco estas certe io



Statuo de sankta Johano Vianney en kapelo de la Alta Porpastra Seminario en urbo Vroclavo, Pollando, kie en la jaro 2009 okazis la 19-a Ekumena Esperanto-Kongreso.

treege granda. La sacerdoto tion plene ekkomprenos nur en la ĉielo. Se ni surtere ekkomprenus, kio estas la sacerdoteco, ni mortus, ne pro emocio, sed pro amo.

Sed la sacerdoto ne estas sacerdoto nur por si mem: Li mem al si ne povas doni pekabsolvon eĉ ne alian sakramenton. La sacerdoto ne vivas por si mem, la sacerdoto vivas por vi. Se iu volas lik-

vidi religion, unuavice li atakas la sacerdotojn, ĉar tie, kie ne estas la sacerdoto, kie ne estas la ofero de la sankta meso, ne estas Dia kulto. La sacerdoteco estas inklino de la Koro de Jesuo. Se vi renkontos sacerdoton, ĉiam vi pensu pri Jesuo”. (*el prediko pri la sacerdotoj*).

La sanktan donacon de la sakramento de sacerdoteco enmetas Jesuo en

kompetentajn korojn de la malfortaj kaj pekemaj homoj.

Tial estas ege grava, ke la kredantoj ĉiutage preĝu por la sacerdotoj, por ilia persistado en animzorga servo kaj por sankteco de ilia vivo. El falo de sacerdoto nur ĝojas satano kaj liaj favoruloj.

Fragmento el pola revuo Milujcie się 4/2009.

OCEANO DA VERO

*Rano sur la fundo de la puto estas konvinkita, ke la ĉielo ne estas pli granda ol la potkovrilo.
Vietnama proverbo.*

Mi trovis en subtegmentejo de la malnova lernejo malgrandan broŝureton el la kvindekaj jaroj, kun ne pli ol 20 paĝoj da teksto; prezo du kronojn. Titolo? Kompendio de la sciencista ateisto.

Tiam sufiĉis tralegi tiun ĉi spirite malfortan verketon kaj iu leganto, kiu el tiu ĉi “faksfero” neniam ion alian legis, povus opinii, ke li tiumomente estas ne nur forĝita ateisto sed ankaŭ sciencisto. La titolo ja tion proklamis...

La tempo progresis, la prezoj de la presajoj altiĝis, la similtemaj broŝuroj ne plu aperadas, sed iaj restis: stultulo, al kiu sufiĉas tiel ege malmulte legi, povus havi la impreson, ke li scias la maksimumon. Anstataŭ mallarĝmensecaj kompendioj hodiaŭ aperas vico da taggazetoj, semajngazetoj, monatĵurnaloj – kaj ju pli riĉaj ili estas por la okulo, des pli malriĉaj ili estas por la animo. Sed la “saĝa” leganto ĝojegas. Danke al ili li opinias esti eble la unua, kiu scias, kun kia virino edziĝas tamburisto de muzikista grupo lokiĝinta en la kvardeka loko de la nuntempa popmuziko. Tio ja estas informo rekte la vivon savanta...

Nia saĝulo tiumomente sentas sin spertulo pri la kulturaj okazaĵoj en la mondo, sed ankaŭ plene informita kaj valora civitano de sia lando. La intensiva sento de la propra ensekretiĝo ekaperos en la momento kiam li, per tiel grava

“vero” feliĉigas la ĉirkaŭan, ĝis nun neinformitan mondon. Tiam li sentas sin kiel vera apostolo de la novaj ideoj.



IKUE-ano D-ro Max Kašparů, Ĉeĥio

Krom tio, ke li estas konanto de la detalaĵoj, li eĉ havas altkulturitan bongustecon. Alispecajn ĵurnalojn li do neniam prenis enmane.

Al la ĝojo de la homa animo apartenas la scio, ke post flako de la konado estas la oceano de la vero – kaj post ĝi la senfina Dio. Tial tiuj homoj vere saĝaj sopiras ĉiam pri plua kaj plua sciado. Jam la latina proverbo diradis: *Timeo lectorem unius libri* (Mi timas leganton de nur unu libro).
D-ro Max Kašparů

DOKTORO PIERRE CORRET (1881-1936)

Ĉi tiu artikolo estas kontribuo de la fama E-historiisto **Jean Amouroux** al la 100-jariĝo de IKUE 1910-2010. Ni kore dankas la aŭtoron.

Tuj post la morto de Pierre Corret, la konata franca katolika ĵurnalo "La Croix" (La Kruco) aperigis nekrologon fare de Eugène Aisberg pli ol sepdeklinian, tamen sen mencii Esperanton.

Ĝi aperis sensanĝe en aliaj periodaĵoj, interalie en la monata bulteno (n-ro 68,-, 10 septembro 1936) de la unuagrada pastra seminario de Versajlo. Ni tiel ekscias, ke en ĝi P. Corret lernis kaj poste instruis fizikon de 1923 ĝis 1927. Rekonita kiel bonega instruanto ĝis sia morto li ĝuis estimon ĉe la seminario. Eĉ lia kaligrafio estis tiu de instruisto.

Esperantisto li estis de la 1-a de januaro 1903, skribis li. Ne eksterordinara estas tia precizigo el la plumo de Corret.

Allogita de radiotelefonia tekniko junaĝe, li estis aprecata fakulo kaj praktikanto. Ankaŭ klere literaturema li estis, sed li sin turnis al medicino. Notindas, ke la doktoriĝa tezo, kiun li defendis en Parizo la 26-an de novembro 1908, temis pri "Utileco kaj ebleco alpreni helpan internacian lingvon por medicino". Li tiel estis diplomita kuracisto kun eksterordinara mencio "tre bone". En aŭgusto 1914 li estis mobilizita kiel kuracisto unue en Grenoblo, Alzaco, Vogejoj ktp. ĝis la militofino.

Medicinon li praktikis en hospitaloj, sed li neniam volis havi kabinetan klienta-



*n. Parizo, 11.03.1881
m. samloke, 07.08.1936*

ron. Li vivis tre malriĉe. Li estis enhospitaligita dum du jaroj kiel malsanulo ("La Movado" de februaro 1931) kaj «longa sinsekvo de malsanoj malebligis al li intensan laboron. Nur depost tri jaroj li povis denove labori» (el nekrologo en Esperanto de E. Aisberg en "Paris-Esperanto" n-ro 78 (168) - oktobro 1936). Li estis elektita membro de la Lingva Komitato en 1909 kaj de la Akademio de Esperanto en 1920. «Li preskaŭ parkere konis la

verkojn de Zamenhof kaj konsilis, ke oni lernu Esperanton antaŭ ĉio en la verkoj de Zamenhof» (nekrologo de Jean Couteaux en "Franca Esperantisto", okt/aŭg 1936).

La ĉefkunlaboranto de "Enciklopedio de Esperanto" Louis Bastien ne sukcesis ricevi biografiajn notojn de P. Corret kaj li skribis al Bleier: «*Mi raportis pri Corret laŭ mia scio, ĉar li obstine rifuzis respondi dirante, ke li malŝatas ĉiun reklamon, ĉiun memoraĵon*»... «*li respondis, ke li ne havas foton, mi detranĉis foton el "La Movado"*» - (n-ro 89 - aŭg.-sept. 1926). Danke al familia arkivo ni povas hodiaŭ montri portreton de P. Corret el legitimilo de junio 1909. Laŭ la mortoakto li estis deklarita kiel fraŭlo dum li vivis kunule ekster geedziĝo, kio ne kongruis kun la etiko de lia religiema familio.

Por “Lingvo Internacia” (majo 1910) li protokolis la fondkongreson de IKUE en Parizo, sed en arkivo de la koncerna kongreso al mi alirebla, mi ne legis la nomon de P. Corret eĉ ne en la ekskurso en Versajlo, kie li loĝis kaj ankaŭ ne en membro-listoj de IKUE, kiujn mi povis konsulti. Lia kongresa raporto aperis ankaŭ broŝurforme.

Kiel katoliko kaj kiel senkompromisa fundamentisto li estis tre atenta al la prilaboro de la brita biblia komitato, kiu subgvide de J. M. Warden publikigis tradukon de la Biblio en Esperanton.

“Espero Katolika” de aprilo 1926 atentigis: «*Al kelkaj: Pri la tradukoj bibliaj de D-ro Zamenhof: La Eklezio severe kondamnas la bibliajn eldonaĵojn de la protestantaj societoj. Sekve ĉiu katoliko ne rajtas legi ilin*». En la sama “Espero Katolika” estas vendolisto de “Verkoj rekomendindaj al nia legantaro” kaj Corret substrekis: Eliro, Levidoj, La Sentencoj de Salomono, La Predikanto tradukitaj de Zamenhof (ĉio ĉi el la postlasaĵo de Corret).

La 20-an de julio 1926 - do antaŭ la edimburga Universala Kongreso - W. M. Page skribis al Corret: «*Mi danke ricevis vian leteron de la 17-a, kiun mi transdonos al la Akademianoj, kiuj laboris ĉe la eldonado. Ili respondos sendube. Sed laŭ mia scio, nenia ŝanĝo estas farita por taŭgigi la tradukaĵon al iu sekta religio – romkatolika, anglokatolika, – vere (tiel) katolika - aŭ protestanta. Feliĉe la revizio estas farita ne de pastroj, sed de lingvaj kompetentuloj, kies zorgo pri konservo de zamenhofs originaleco estas tiel fervora kiel via*».

**El la dua kovrila paĝo de Espero Katolika
aprilo 1926**


Du tagojn poste Warden, sekretario de la Esperantista Biblia komitato, skribis al Corret: «*S-ro Page transdonis al mi vian leteron de la 17-a de julio. Dume, mi estas superŝutita de la kongresaj laboroj, sed post la kongreso kaj post libertempo kaj ripozo mi reskribos al vi. Ĝis tiam mi petas, ke vi bonvolu pacienci*».

Efektive, la 21-an de januaro 1927, Warden skribis al Corret: «*De longe mi esperis respondi al kelkaj viaj rimarkoj pri la nova Esperanta Biblio, sed mi atendis, ĝis mi povos sendi al vi ekzempleron de la volumo*».

La rimarkigoj de Corret do restis senreeĥaj, ĉar la reviziita Biblio en Esperanto estis presite prezentita kadre de la Universala Kongreso, la 1-an de aŭgusto 1926, en la katedralo de Edimburgo.

Laŭ franca esprimo, “al Corret nur restis la okuloj por plori”, sed li trakribis la novan biblian eldonon. Dum tre multaj jaroj – mi trovis spuron pri 1934 – kvankam sen praktika efiko – li korespondadis kun William Bailey, kiu, skribis li al Corret (la 11-an de januaro 1928):





Transskribo de la supra Corret-teksto:

La Brita eldono de la Biblio

Japana opinio en "Paroladoj de D-ro L. L. Zamenhof" (dua eldono, p. 97-98):

"Ĉiuj citaĵoj en la Rimarkoj estas el Zamenhofaĵo, sed nur el tiuj pecoj, kies aŭtentikeco estas pruvita (vidu Zamenhof-Radikaron p. 10). Ni do citas rilate al la Biblio nur el la 8 apartaj libroj eldonitaj de Hachette kaj K-o kaj ne el la Biblio eldonita en Londono, ĉar ni rigardas la unuan kiel pure Zamenhofan, dum ni vidas en la dua, ke lia stilo estas multloke ŝanĝita. Kion ni bezonas por nia studo estas pureco de lia stilo kaj ne vereco de bibliaj faktoj nek fideleco de la traduko. La ok libroj estas Genezo, Eliro, Levidoj, Nombroj, Readmono, Psalmaro, Sentencoj kaj Predikanto".

Ekzemple: "fronto kontraŭ fronto" de Rakontoj el la Biblio, p. 42/1 est deŝanĝita (*fariĝis*) "frontoN kontraŭ fronto" dans (*en*) "La Sankta Biblio" 1. Samuel 17/21

«Kiom mi scias, mi ne estis elektita kiel membro de la Biblia Komitato, sed mi dediĉis al la preparado de la traduko tre grandan kvanton da tempo kaj da fervora laboro. Tiu laboro daŭris eĉ ĝis post la apero de la volumo; mi diligente serĉis preserarojn kaj aliajn plibonigeblajn lokojn, kaj antaŭ ĉirkaŭ unu monato mi atingis la finon. La Biblia Komitato farus al la Esperantistaro tre malbonan servon, se ĝi eldonus la Zamenhofan tradukon de la Malnova Testamento sen revizio». Feliĉe, Zamenhof antaŭvidis tian situacion kaj "ludovikito" notis: «tio ĉi estis bedaŭrindaĵo por kelkaj esperantistoj, kiuj legis la leteron de Ludoviko 1914-6-25 al Harold Bolingbroke Mudie, ke tio (= fari ŝanĝojn) estu farata ne sub lia nomo». Tiu citaĵo estas de Itô Kanzi (ludovikito), al kies memoro ni ŝuldas profundan dankon pro lia jubilea eldono (1987). Ja en du volumoj, "de Jeĥezkel al Malaĥi" kaj "de Josuo al Jeremia", estas faksimilo de la tuta originala manuskripto de la biblia traduko de Zamenhof. Estas bela omaĝo ne nur al Zamenhof, sed ankaŭ al la abnegacia kaj sendanka prilaborego de Pierre Corret.

Jean AMOUROUX

Postnotoj

- Pri la de mi cititaj nomoj bv. legi pli en "Enciklopedio de Esperanto".
- Pri Pierre Corret bv. legi pli en "Franca Esperantisto" – speciala literatura numero – n-ro 446 - oktobro 1993.

PREĜO AL JESU-INFANO DE PRAGO

La preĝo de papo Benedikto la 16-a al Jesu-Infano de Prago, kiun li preĝis okaze de sia vizito en preĝejo de la Virgulino Maria Venka en Praha la 26-an de septembro 2009.

Sinjoro Jesuo, ni havas Vin antaŭ la okuloj kiel infanon kaj ni kredas, ke Vi estas Filo de Dio, kiu fariĝis homo pere de la Sankta Spirito en sino de la Virgulino Maria.

Simile kiel en Betlehemo ankaŭ ni, kune kun Maria kaj Jozefo, anĝeloj kaj paŝtistoj, adorkliniĝas antaŭ Vi kaj konfesas, ke Vi estas nia ununura Savinto.

Vi fariĝis malriĉa, por ke ni riĉigu el via malriĉeco: donu, ke ni neniam forgesu malriĉulojn kaj tiujn, kiuj suferas.

Protektu niajn familiojn, benu al ĉiuj infanoj de la tuta mondo kaj donu, ke nin ĉiam regu la amo, kiun Vi alportis, por ke ĝi igu la vivon pli feliĉa.

Donacu al ĉiuj homoj, Jesuo, ke ili komprenu mesaĝon de Dia naskiĝo, ke ili komprenu, ke vi venis donaci al la tuta homa familio lumon, ĝojon kaj pacon.

Ĉar Vi estas Dio kaj Vi vivas kaj regas kun Dio la Patro en unueco kun la Sankta Spirito en ĉiuj jarcentoj. Amen.



La Jesu-Infanon ornamas kroneto, kiun al Li donacis Papo Benedikto la 16-a dum sia vizito en Ĉeĥa Respubliko. Ornamado de la Jesu-Infano de Prago per kronetoj kune kun vestigado en vestetojn apartenas al tradicio de Jesu-Infano. La reĝan kroneton, kiun donacis al Li la Papo, ornamas kromalie ok konkajoj, kiuj estas simboloj de sankta Aŭgusteno. Sub la kroneta kruceceto kaŝiĝas surskribo kun dato de la papa donaco. La kroneton ankaŭ riĉigis veraj perloj kaj grenatoj. La kroneto estas pretigita el arĝento kaj orumita.

La Jesu-Infanon de Prago vizitadas kredantoj el la tuta mondo kun petoj pri el-aŭdo de iliaj petoj. La statueto estas laŭ fakuloj historie dokumentita en la 16-a jarcento. Legendo rakontas, ke Jesueto aperis al hispana monaĥo, kiu laŭ lia aspekto elmodlis la vaksan statueton. Laŭ plua legendo posedis la statueton sankta Tereza de Jesuo, fondintino de nudpiedaj karmelanoj. Ŝi onidire ĝin donacis al sia amikino, kies filino vizitis Pragon. Kiam en la jaro 1556 dukino Maria Manrique de Lara iĝis edzino de Vratislav el Pernštejn, ŝi ricevis la statueton de sia patrino kiel geedziĝan donacon. Ŝia vidva filino Polyxena el Lobkovic poste la valoran statueton donacis en la jaro 1628 al la klostro de nudpiedaj karmelanoj ĉe preĝejo de la Virgulino Maria Venka en Prago.

ALPAROLO OKAZE DE BENO KAJ ASPERGO DE LA MEMORŜTONO VATIKANO 2

omaĝe al papo Johano Paŭlo la 2-a en Malbork la 3-an de aŭgusto 2009

Estimataj partoprenantoj de la inaŭguro de Esperanto-memorŝtono omaĝe al papo Johano Paŭlo la 2-a!

Karaj fratoj kaj fratinoj en Kristo!

Antaŭ ĉio mi salutas vin kore kaj dankas pro via alveno kaj ĉeesto en hodiaŭa ceremonio honoriganta la neforgeseblan papon Johanon Paŭlon la 2-an.

Precipe mi dankas kaj gratulas al tiuj, kiuj iniciatis la aranĝon kaj inaŭguron de tiu ĉi ceremonio.

Papo Johano Paŭlo la 2-a vere meritas ankaŭ tian memoron, ĉar krom liaj grandaj verkoj li precipe kontribuis al la altigo de la signifo de internacia lingvo Esperanto. Li ja enkondukis tiun ĉi lingvon en la liturgion de la Katolika Eklezio. Li ankaŭ, unua papo, uzis la idiomon “kvazaŭ novan latinon” en sia oficiala komunikado kaj faris tion ne nur kun Dia Popolo okaze de kutimaj plurnaciaj asembleoj, ekz. en la jaro 1991, sed ankaŭ en siaj alparoloj al la tuta homaro okaze de la paskaj kaj kristnaskaj mesaĝoj, konataj latinlingve kiel la mesaĝoj *Urbi et Orbi*.

La vere mejla ŝtono en la historio de Esperanto estis certe lia aprobo de la Esperanta Meslibro. Estas rimarkinde, ke li faris tion, kiel atestas la ĝenerala sekretario de IKUE Carlo Sarandrea, malgraŭ la deklarita malkonsento de la Vatikana Kurio. Laŭ la menciita sekretario jam pro tiel kuraĝa kaj profeta decido papo Johano Paŭlo la 2-a meritas la saman honoron kaj estimon, kiel iam (ĉirkaŭ 868-a jaro) papo Hadriano la 2-a, kiu kuraĝe

aprobis la slavan lingvon de la sanktaj fratoj Cirilo kaj Metodio, kio tiamatempe estis vera skandalo.

Pro tio, konsciaj pri tio ni hodiaŭ alpaŝas al beno kaj aspergo de la E-memorŝtono omaĝe al la Servanto de Dio papo Johano la 2-a.



Alparolo de pastro Roman Forycki Foto: Eduard Kozyra

Celebranto: En la nomo de la Patro kaj de la Filo kaj de la Spirito Sankta.

Ĉiuj: Amen.

Cel.: La Sinjoro estu kun vi.

Ĉiuj: Kaj kun via spirito.

Cel.: Ni preĝu: Sinjoro Dio ĉiopova, degnu beni tiun ĉi ŝtonon oferitan de la esperantistaro omaĝe al via Servanto la papo Johano Paŭlo la 2-a kaj faru, ke la homoj ne nur admiru lin, sed ankaŭ aŭskultu lian voĉon kaj imitu liajn agojn, kaj ke ili tiamaniere estu pli feliĉaj mem kaj portu pli da feliĉo al ĉiuj homoj kaj popoloj. Per Kristo nia Sinjoro.

Ĉiuj: Amen.

(*Poste sekvis la aspergo per la sanktigita akvo.*)

Sac. Roman Forycki

PATRINO TEREZA – “LA SIMPLA VOJO”

(Skopje 1910 – Kalkuto 1997)

AMI KAJ AGI FIDANTE

*“Ne gravas, kiom ni faras,
sed kiom ame ni faras.”*

*Prelego de Prof-ro Endre Dudich,
Budapeŝto, Hungario, okazinta la 21-an
de julio 2009 kadre de la 19-a Ekumena
Esperanto-Kongreso en Vroclavo*

Ŝi estas vaste konata persono. Ĉiu bone scias, ke ŝi naskiĝis en Skopje, estis makedonino, profesia flegistino, kaj estas jam sanktulino de la katolika eklezio.

Sed ĉiuj scias tion malbone. Ĉio ĉi malprave.

Ŝi naskiĝis en Üsküb, ĉar tiutempe (1910) la nuntempa Skopje troviĝis ankoraŭ en la Otomana turka imperio. Ŝi ne estis baptita Tereza, sed Agnes. Ŝi ne estis makedonino, sed albanino. Laŭprofesie ŝi ne estis flegistino, sed me-



zlerneja instruistino. Kaj ŝi (ankoraŭ) ne estas proklamita sanktulino, “nur” beatulino.



Prof-ro Endre Dudich

La familio Gonxha Bojaxhio apartenis al la komunumo de la romkatolikaj albanoj (eble eĉ arumanoj). La patro Nikolë estis laboristo, poste entreprenisto en la konstruindustrio. Li mortis murdite pro sindikata aktivado, kiam Agnes, la tria ido, estis 9-jara. Atinginte la aĝon de 18 jaroj, ŝi aliĝis al la monaĥina ordeno “Fratinoj de Loreto” de Irlando, kaj surprenis la nomon Tereza, laŭ la franca “eta” Sankta Tereza de Lisieux, patronino de la misiistoj.

Post kelkmonata prepariĝo ŝiaj superuloj sendis ŝin al Darĝilingo en Hindio. Ekde 1930 ĝis 1948 fratino Tereza instruis geografion kaj religion en la Kolegio de Sankta Maria en la granda urbo Kalkuto. En 1946 ŝi estis nomumita direktorino de tiu lernejo de knabinoj.

En la sama jaro 1946 ŝi havis vizion dum vojaĝo per trajno. Ŝi petis kaj – ne tro facile – ricevis permeson fondi lernejon en la mizerkvartalo de Kalkuto. En 1949 ŝi ellernis la arton de malsanulflegado, iĝis civitanino de Hindio, kaj vestis sin laŭ hindia maniero (blanka sario kun bluaj strioj). Tereza komencis kolekti, flegi kaj instrui la forlasitajn, surstrate

vivaĉantajn infanojn kaj senhejmulojn, konsoli la mortantojn.

En 1950 Tereza, akirinte la permeson de papo Pio la 12-a, fondis novan monaĥinan ordenon nomitan Fratinoj de la Misiistoj de la Karitato. Ŝi flegis ankaŭ leprulojn kaj AIDS-ulojn, konsoladis ilin kaj preĝis pro ili, ke ili forpasu digne, en paco kun Dio kaj kun si mem.



En 1963 estiĝis la vira branĉo de la ordeno, kaj en 1976 la “kontempla” branĉo (Fratinoj de la Parolo).

Jam kiel patrino Tereza ŝi ricevis la unuan distingon en 1962, la Padma Shri Premion. Tion sekvis la Kennedy Premio, la Nehru Premio kaj la Albert Schweitzer Premio. Ŝi ĉiam uzis la monon por fondi novajn rifuĝejojn ktp., jam ne nur en Hindio (en la jaro 1989 ankaŭ en Budapeŝto kaj Érd, kaj poste en Miskolc). Ŝi vojaĝadis multe, kaj renkontiĝis kun multaj eminentuloj de la mondo, de Lady Diana ĝis prezidento Bill Clinton. (kiu donis al ŝi honoran usonan civitancon).

En 1987 patrino Tereza ricevis Nobel-premion por la paco. Tiam ŝi luktis jam kontraŭ kormalsano. Havis du infarktojn, en 1983 kaj 1989 (tiam ŝi ricevis kor-ritmoregulilon). En 1991 ŝi vizitis Albanion, kiu ĵus ĉesis esti oficiale deklarita ateista lando. Nun la flughaveno de la ĉefurbo, Tirana, portas ŝian nomon.

Patrino Tereza mortis, 87 jarojn aĝa,

la 5-an de septembro 1997 en Kalkuto. La registaro de Hindio ordonis tritagan nacian funebbron.

Multnombraj estis tiuj, kiuj konsideris la iniciaton de fratino Tereza malutila kaj senespera utopio. Ilia pensmaniero estis tute racia kaj logika. Sed poste evidentiĝis, ke ili tamen malpravis.

En la momento de la forpaso de patrino Tereza, en 123 landoj de la mondo funkciis 610 misiejoj de la ordeno, en kiuj laboris pli ol 4.000 monaĥinoj kaj pli ol 100.000 volontulaj flegistoj.

Evidentiĝis el ŝiaj leteroj publikigitaj (sen ŝia aprobo), ke dum jardekoj patrino Terezan kruele turmentis anima sekeco kaj spirita malhelo. Toleri tion humile kaj resti fidela signifas superagrade praktiki la virtojn. *“Nek alteco, nek profundeco, nek iu alia kreitaĵo povas nin apartigi de la amo de Dio, kiu estas en Kristo Jesuo, nia Sinjoro.”* (Rom 8,39)



Papo Johano Paŭlo la 2-a solene proklamis ŝin beatulino la 19-an de oktobro 2003, en la ĉeesto de kvaronmiliono da pilgrimuloj. Ŝia festotago estas la 5-a de septembro.


HIMNO DE LA VIVO



- La vivo estas unika, do prenu ĝin serioze!
- La vivo estas bela – admiru ĝin!
- La vivo estas feliĉo – gustumu ĝin!
- La vivo estas sonĝo – realigu ĝin!
- La vivo estas defio – akceptu ĝin!
- La vivo estas devo – plenumu ĝin!
- La vivo estas ludo – ĝuu ĝin!
- La vivo estas trezoro – profitu el ĝi!
- La vivo estas amo – transdonu vin al ĝi!
- La vivo estas tristeco – venku ĝin!
- La vivo estas melodio – kantu ĝin!
- La vivo estas lukto – finluktu ĝin!
- La vivo estas aventuro – entreprenu ĝin!
- La vivo estas premio – meritu ĝin!

Patrino Tereza

Mirindaĵo vidiĝis en la ĉielo: virino vestita per suno, kaj la luno sub la piedoj, kaj ĉirkaŭ ŝia kapo krono el dek du steloj.



LAŬDKANTO DE MARIA

“Mia animo altigas la Eternulon, kaj mia spirito ĝojas en Dio, mia Savanto, ĉar Li rigardis la humilecon de sia servantino, ĉar jen de nun ĉiuj generacioj nomos min feliĉa. Ĉar la Potenculo faris al mi grandaĵojn, kaj sankta estas lia nomo. Kaj lia boneco estas por ĉiuj generacioj al tiuj, kiuj Lin timas. Li montris forton per sia brako, Li dispelis fierulojn en la penso de ilia koro. Li malaltigis potenculojn de iliaj tronoj, kaj li altigis humilulojn. Malsatulojn Li plenigis per bonaĵo, kaj riĉulojn Li forsendis malplenaj. Li helpis sian servanton Izrael, memorante sian korfavoron, kiel Li parolis al niaj patroj, al Abraham kaj al lia idaro eterne.”

Luk 1, 46-55

KATOLIKA ESPERANTO-MOVADO EN LITOVIO

Jesuo Kristo diris: “Jen mia ordono – kiel mi agis, vi tiel agadu, unu la alian korege amu, ĉar la malamo venas de malbono...” A. Dambrauskas (A. Jakštas)

La historio de la internacia katolika movado estas preskaŭ samaĝa kiel la lingvo mem. Unu el pioniroj de tiu movado estis litova pastro, Aleksandras Dambrauskas (1860-1938), kiu ankoraŭ studante en Sankt-Peterburga akademio eksciis pri la apero de Esperanto. Laŭ onidiroj estis li, kiu la unua skribis poŝtkarton al L. Zamenhof en Esperanto. A. Dambrauskas en 1890 verkis la unuan lernolibron de internacia lingvo por litovoj. En 1893 li jam komencis verki originalajn poemojn en Esperanto, precipe pri religiaj temoj. Samtempe A. Dambrauskas komencis la publikan animzorgadon inter esperantistoj. La 26-an de decembro 1896 en Smolensk li celebris latine la unuan Sanktan Meson por esperantistaro, sed la homilio kaj kantoj estis en internacia lingvo. En la Diservo partoprenis L. Zamenhof. A. Dambrauskas postlasis por ni malgrandan kantareton de ekleziaj kantoj. Esperantigi ilin helpis L. Zamenhof mem. En 1893 okaze de la 50-jara episkopeca jubileo de Lia Sankteco papo Leono la 13-a aperis longa poemo de A. Dambrauskas: “Estu, estu”.

En 1903 komencis sian ekziston revuo “Espero Katolika”, kiu ĝis nun, dum pli ol 100 jaroj, proklamas la ideojn de la frateco laŭ evangelia spirito. Sur la unua paĝo de la menciita revuo (n-ro 1, oktobro 1903) estis publikigita la poemo de A. Dambrauskas “Al Lia Plej Sankta Moŝto Papo Pio la Deko”. En 1905 pastro, poeto, sciencisto kaj tradukisto A. Dambrauskas partoprenis en la unua tutmonda Esperanto-kongreso en Bulonj-sur-Mar. Ĝin ĉeestis multaj pastroj kaj la epizodojn de tiu ĉi kongreso beletre priskribas itala verkisto Vitaliano Lam-

berti en sia libro “Una voce per il mondo” (litova traduko el itala, 2002). En la paĝo 327 de la litova versio ni legas:

“Ĉi tie estas multaj pastroj, klariĝas Michaux. Jen ili... ĉiuj kune. Pastro Dambrauskas, pastro Rousseau... Vidu, kiel ili babilas kun tiuj du... Maldekstre estas abato Peltier kaj tiu alia – la altranĝa sacerdote el Romo Luigi Giambene. Ili ridetas. Amiko, tio jam estas bona signo...”

En 1906 Pio la 10-a akceptis pastron Luigi Giambene, kiu donacis al la papo la unuan jarkolekton de “Espero Katolika”. La rigardo de la papo, laŭ rememoroj de L. Giambene, falis sur la poemon de A. Dambrauskas. Pio la 10-a provis legi, ridetis kaj poste diris: “Mi ne povas legi, sed mi bone komprenas”. En tiu kolekto de la revuo estis publikigita ankaŭ alia poemo de A. Dambrauskas “Dio”. La aŭdienco de Pio la 10-a al L. Giambene rezultigis la unuan papan benon al “Espero Katolika” kaj al la tuta esperantistaro.

En 1910 fondiĝis Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista (IKUE). A. Dambrauskas energie subtenis ĝin kaj klopodis anigi al ĝi litovajn esperantistojn. Tamen pro ekzistantaj tiamaj politikaj kaŭzoj tio ne eblis. En 1910 sub iniciato de A. Dambrauskas estis fondita Kovna Esperantista Societo. En 1919 ĝia aktiveco plivigliĝis, ĉar Litovio tiam jam estis sendependa ŝtato, kaj tiu ĉi societo transformiĝis en Litovan Esperanto-Asociacion. La 10-an de septembro 1920 pastro A. Dambrauskas fondis litovan sekcion de IKUE, kies anoj renkontiĝadis unufoje semajne komence en loĝejo de aktivulo P. Medemas, poste ĉe pastro A. Dambrauskas. Pri tio detale skribas P. Enskaitis en sia artikolo “Kaunas sub la verda flago” (LS, 1938, n-ro 3, pg. 10). Pastro A. Dambrauskas propagandis Esperanton inter sacerdotoj kaj seminariis-

toj de Kaunas. Bedaŭrinde niaj scioj pri tiu agado estas ege mizeraj.

Alia entuziasmulo de Esperanto estis la beata ĉefepiskopo (1987) Jurgis Matulaitis (1871-1927). Neniu povas atesti, ke li scipovis la internacian lingvon, tamen li ege subtenis la movadon kaj en ĝi vidis grandan estontecon. En 1926 en la pollingva katolika gazeto "Gazeta Kościelna" (n-ro 33) la beatulo publikigis ampleksan artikolon sub titolo "Esperanto en servo al la Eklezio". En ĝi interalie ni legas jenon: "Estas ĝenerale konata, ke inter provoj de la internacia lingvo - Esperanto plenumis plej bonan rolon kaj nun ĝi estas ĉie konata. (...) Plej efike uzadas ĝin komunistoj, socialistoj, senkreduloj, liberpensuloj, framasonoj, judoj kaj sektanoj. (...) Teroristoj uzadas Esperanton efike al siaj celoj, kaj la katolikoj plej ofte atendas, kvazaŭ ili timus malpuriĝi per Esperanto. (...) Tamen estus malprudente ne uzi la lingvon pro tio, ke verkis ĝin judo. Al ni pleje gravas, (...) ke Esperanto povas alporti profiton al la katolikismo".

Ni ne scias, ĉu tiu artikolo estis legata en Litovio aŭ ne, sed estas nediskutinda fakto, ke nia beata J. Matulaitis, perfekte scianta la latinan lingvon, favoris la disvastigon de Esperanto en la katolikan medion.

Dum la soveta regperiodo la ateisma agado enradikiĝis kaj atingis sian kulminon. Tiam oni eĉ ne rajtis paroli pri esperantistoj-katolikoj. La esperantista movado mem entute ne estis tolerata kaj ofte persekutata. Tamen en tiuj nigraj jaroj kelkaj esperantistaj katolikoj kaŝe penis apostoli, agi, rilati kun ĉeĥaj, polaj, hungaraj gefratoj en Kristo. Oni devas mencii la poetinon kaj tradukistinon A. Judickienė (1934-1991), samideanon J. Tamošiūnas kaj precipe pastron V. Rudzinskas, kiuj danke al kontribuo de poloj kaj ĉeĥoj kun ega risko disvastigadis religiajn librojn en Esperanto, revuon "Espero Katolika" k.a.. Tre koraj

renkontiĝoj de litovaj esperantistoj – katolikoj B. Aukštikalnienė kaj L. Škūpas okazis dum jubilea UEA-kongreso en Varsovio. La donace ricevitaj rozarioj, materialoj pri 600-jara jubileo de Bapto de Litovio, grandformata Krucifikso donacita de belga frato, estis subĉemize transportitaj en Litovion. Similaj faktoj multas.

Nur litovaj pastroj, kiuj loĝis eksterlande, agis libere. En Brazilo la pastro salezano P. Urbaitis preskaŭ ĝis sia morto en 1993 gvidis kursojn en litova paroĥo de Vila Zelina en São-Paulo; li estis redaktoro de E-gazeto "Brazila Katolika". Alia pastro salezano P. Gavėnas (1918-2002) komence en Italio, poste en Brazilo, aktivis por Esperanto, verkis libron "Sankta Kazimiro".

En 1994 estis restarigita la litova sekcio de IKUE. Ĝin gvidis samideano Vladislavas Viršila. La sekcianoj organizis katolikajn renkontiĝojn en Ŝiluva, Kretinga, Panevėžys, partoprenis en la internaciaj IKUE-aranĝoj. Tamen la movado pro subjektivaj kaŭzoj iom post iom komencis stagnadi. Same ege mankis pastroj – esperantistoj, la junularo preskaŭ ne aktivis. Sed danke al iniciatoj de litovaj luteranoj en 1995 en Kaunas okazis la 11-a ekumena kongreso de la esperantistoj. En 2000 la litova sekcio de IKUE denove renaskiĝis. Ĝiaj gvidantoj estas Mons-ro Lionginas Vaičiulionis kaj d-ro Laurynas Skūpas. La anoj de la sekcio legas revuojn "Espero Katolika" kaj "Dio Benu", partoprenas en la internaciaj kaj naciaj aranĝoj, esperantigas litovajn religiajn kantojn, aŭskultas E-elsendojn el Vatikano, popularigas la internacian lingvon ĉe pastroj, organizas celebrazon de Sankta Meso en Esperanto dum BET-oj (Baltaj E-Tagoj) aŭ aliaj tradiciaj aranĝoj, spektas religiajn videofilmojn. Multaj ne IKUE-anoj ankaŭ partoprenas en la menciitaj aranĝoj. Jam estas kelkaj pastroj - entuziasmuloj de Esperanto: S. Keras, G. Pušinaitis, P. Sabaliauskas, T.

Skrudupis, K. Balsys. Aktivas la seminariisto el Telšiai M. Dyglys (*nun li jam estas pastro, ndlr*).

La plej grava tasko estis bone organizi la 57-an IKUE-kongreson en Kretinga, okazintan la 3an ĝis la 10-a de julio 2004. En la kongreso partoprenis multaj gefratoj el diversaj landoj, kiuj ne nur kunsidis kaj preĝis, sed ankaŭ vizitis litovajn pilgrimlokojn Šiluva, Tytuvėnai, Monteton de Krucoj, Palanga k.t.p. La temo de la internacia kongreso estis “Malbonon venku per bono” (Rom 12, 21). Tiu ĉi frazo estis same la slogano de nia beata Jurgis Matulaitis, protektanto de Esperanto. Ni petis lin beni ne nur la kongreson, sed ankaŭ la tutmondan kristanan esperantistaron.

*D-ro Laurynas Skūpas,
estraro de IKUE*



Tiun ĉi koncizan priskribon de la katalika E-movado en Litovio verkis frato Laurynas Skūpas en la jaro 2004, post la tre sukcesa 57-a IKUE-Kongreso okazinta tiujare en Kretinga, kies ĉefaranĝanto li estis. Li mortis la 10-an de januaro 2005 pro kancero.

SALUTON, MARIA!

Al Marcel Naster

Saluton, Maria, laŭdata Reĝino,
Vi ĉies plej bona, plej milda Patrino
kun nobla animo kaj koro perfekta.

Vi estas dotita, ho Virga Lilio,
per vortoj plej belaj, pro privilegio!
Bonvolu disdoni ĉi tiujn riĉaĵojn,
kaj ankaŭ purigi pekulajn vizaĝojn.

Saluton, Elektro de nia Sinjoro!
Pro naskopreteco ĉe sankta deĵoro,
per Dia spirito Vi iĝis patrino,
de Filo ĉiela laŭ antaŭdestino.

De l' tuta homaro alvenas omaĝoj,
ĉar Dio Vin prenis el ĉiuj estaĵoj
por levi ĉielon, ja Senmakulata,
ho simpla virino, Reĝino amata!

Ekzistas por Vi eĉ ne unu barilo,
ni vivas gefiloj sub via elbrilo,
ligitaj de kredo, plej forta sigelo,
Vi estas, Maria, por ni Verda Stelo!

De viaj infanoj la saĝa piloto,
vokita en kampo, kapelo aŭ groto,
miraklojn Vi ŝutas trans ĉiuj la limoj,
nutrante la kredon en niaj animoj.

En ŝlimo perditajn gefratojn konvertu!
Ĥaoson trenantajn, Vi ilin avertu!
Radiu, brilegu, Vi stelo emblema,
Ektuŝu la korojn per strio pacema!

Se mia vortaro nur estas balbutio,
komencas kaj finas per simpla saluto,
Vi scias ke jen, en la faldoj de l' koro
mi dankas plej ĝuste sen vortoj ankoraŭ.

Saluton pro ĉio per grava inkolino!
Saluton, Maria! Tutmonda Patrino,
jam antaŭ ol fiksi ĉe l' mondo la akson,
Vin Dio ekmontris ja sian alttakson.

Anna Meurrens

MOVADAJ INFORMOJ

NOVA PASTRO — Francaj katolikaj esperantistoj ĝojas disdividi tre belan novaĵon: en Parizo, kun tri aliaj dominikanoj, en preĝejo St Médard, sabaton la 27an de februaro 2010 estis ordinata pastro juna dominikano, **fr. Benoît Ente**, kiu flue parolas Esperanton kaj deziras helpi en nia katolika Eo-movado. Lia unua meso okazis en Lille, en la dominikana kunhejmo, dimanĉon la 28an de februaro 2010. Fr. Benoît Ente engaĝiĝis en la dominikana ordeno dum 2007 en Lille kaj estis ordinata diakono dum 2009 en Brazzaville. Pri Esperanto li eksciis de P. Louis Bourdon dum la jaroj 2004-2005 en Lille (*informis: Bruno Masala*)

EN INTERRETO

La libro “Esperanto - la nova latino de la Eklezio” aperis - rete - ankaŭ en hungara lingvo: “Eszperantó az egyház új latinja” - http://www.u-matthias.de/latino/latin_hu.pdf. Ĝin tradukis Jozefo Horvath, kiu nun klopodas trovi eblecon eldoni ĝin ankaŭ en papera formo (la libro aperis paperforme jam en 7 lingvoj - la germana, Esperanto, la angla, rusa, portugala, litova kaj franca). La hungara versio ne estas simpla traduko de la esperanta: la tradukinto transprenis el alilingvaj tradukoj tion, kion li trovis necesa por la hungara publiko; li aktualigis la TTT-ligojn, aldonis kelkajn proprajn komentojn kaj materialojn de ĉefepiskopo Jakubiny kun lia permeso” (*informis: Ulrich Matthias*)

Faksimiloj de verkoj en Esperanto ĝis 1900 legeblas en la retejo de la Aŭstria Nacia Biblioteko, ĉe: <http://www.onb.ac.at/sammlungen/plansprachen/fruehdrucke.htm>. Inter ili estas “Preĝareto por Katolikoj” de Louis de Beaufront (1893) (*informis: Mike Leon*)

En Wikisource (Vikifontaro) al la kvin pliaj latinaj brevier-himnoj estas aldonitaj E-tradukoj: *Fulget in coelis Solis, o Virgo; Te Patrem summum; Te, pater Ioseph; Trinitas, summo*. Oni trovas ilin helpe de la indekso (<http://eo.wikisource.org/wiki/Brevier-Himnoj>) (*informis: p. Albrecht Kronenberger*).

“Esperanto kaj la Eklezio – Ludoviko Zamenhof naskiĝis antaŭ 150 jaroj”: jen la traduko de la titolo de hungarlingva reta artikolo publikigita la 15.12.2009 en la katolika portalo “Magyar Kurír” (<http://www.magyarkurir.hu/de/node/4720>). Estas menciitaj i.a. IKUE, Espero Katolika, la E-lingvaj elsendoj de Radio Vatikana kaj la papaj bondeziroj “*Urbi et orbi*” (*informis: p. Lajos Kóbor*)

La paĝaro de IKUE www.ikue.org proponas la esperantigon de tekstoj pri seksaj trouzoj en la Eklezio. Oni povas legi la intervjuon de la itala katolika ĵurnalo “Avvenire” (13.03.2010) kun mons-ro C. J. Scicluna “akcelanto de justico” de la Kongregacio por la Doktrino de la Kredo (http://www.ikue.org/arkivo/intervjuo_scicluna.htm). Ĝi aperis en multaj lingvoj ankaŭ ĉar mons-ro Scicluna pritraktis temojn kaj respondis al demandoj pri la problemo de pedofilio en la Eklezio, kiuj denove abunde levigas nuntempe en la amaskomunikiloj (eĉ atakante la Papon). La paĝaro de IKUE publikigis ankaŭ la resumon de la letero kiun la Papo sendis al la irlandaj katolikoj pri la sama temaro (http://www.ikue.org/arkivo/letero_irlando.htm).

200 en la arkivo de EK en interreto. Per la enretigo de la numero 6/1974 (http://www.esperokatolika.org/ek19711975/ek1974_06.htm) la 14-an decembro 2009 la nombro da enretigitaj numeroj de ĉi tiu revuo fariĝis 200. La digitalizado de la eldonaĵoj daŭrigis d-ro Antonio De Salvo en la komencaj monatoj de la nuna jaro per la unuaj numeroj de nia revuo, kun sekva des pli peza laboro: fakte la palaj, flaviĝintaj paĝoj de tiuj numeroj - kiuj bezonas apartan zorgeman trafoliadon pro rompiĝemo - estas tre malfacile skaneblaj, kaj sekve oni devas retajpi ilin. Kortuŝaj estas la lingvaj elpensitaĵoj de niaj pioniroj - kiam Esperanto estis adoleskanto kaj kiam mankis vortoj: ekz. “paro” tiam estis “geo”. (<http://www.esperokatolika.org/ek19031905/index.htm>)

La Kristnaska mesaĝo 2009 de la Gardanto de Sankta Lando (franciskano kun Episkopa rango) aperas rete por plia sinsekva jaro ankaŭ en Esperanto, danke al Marija Beloŝević, en la oficiala portalo de la Gardanto (<http://www.custodia.org>) (*informis: Antonio De Salvo*)

ELDONOJ

Nova dokument-filmo “La insulo de la rozoj”. La 30an de januaro 2010 Asocio CER-ES kaj la Rektor-Statusa Preĝejo de Sanktaj Johano kaj Paŭlo aranĝis projekciadon de la dokument-filmo “La insulo de la rozoj”, en la Preĝejo de “Sankta Jozefo ĉe la haveno”, en Rimini (Italio). La filmo (kiun oni jam prezentis dum la “festivalo de dokument-filmoj” de Amsterdamo) pritraktas la historion de la enmara platformo, fronte al la marbordo Viserba-Torre Pedrera, kie inĝ. Giorgio Rosa starigis la “esperantistan respublikon de la Rozoj”, en kiu Esperanto estis la oficiala lingvo (http://eo.wikipedia.org/wiki/Insulo_de_la_Rozoj). Oni planas realigi Esperanto-version de la filmo en DVD.